

Novaĵoj Tamtamas



Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)



エスペラントよこはまのエスペラント文会報

8 prezentaĵoj ĝuitaj

En nia Esperanto-Muzeo Jokohama, okazis jarkutima evento “prezento de spertoj”, en la 7-a de oktobro, de 13-a horo. Entute 14 vizitis, kun 8 prezentaĵoj. El ili, 7 estis faritaj de niaj membroj, tamen la 1-a prezento estis speciala. Jen estis la programo.

- ① (speciala prelego) Kamimura Kazumi, vicprofesoro de la Universitato Zyosai:
“Okazo de Isiga Osamu — praktikado por paco, fare de esperantisto sub la Dua Mondomilito
(temas pri movada historio)
- ② Mizro Iwaya: Flora Centro kaj Granda Avalokiteŝvaro en Oofuna
- ③ Kanoo Hiroyuki: Artfajraĵoj de Minato-Mirai
- ④ Suzuki Keiichiro: Cusco [kusko] en Peruo
- ⑤ Miyazaki Hideko: Enkonduko de Noo-maskoj 4 al alilandaj studentoj (pri tio, legu en p.2)
- ⑥ Murata Kazuyo: Familianoj de Zamenhof
- ⑦ Doi Hirokaz: Ada Fighiera-Sikorska, Ada Sikorska-Fighiera
(la vivo kun “Heroldo de Esperanto”)
- ⑧ Doi Ĉieko: “Infanoj en la mondo” [temas pri libroserio post la 2-a mondomilito, utiliganta Esperanton]





Enkonduko de Noo-maskoj

Miyazaki Hideko

Saluton, hodiaŭ mi volas enkonduki Noo-maskojn. Noo estas japana klasika teatraĵo kaj Monda heredaĵo. Mi interesiĝis pri Noo, leginte la libron, “Mia vojaĝo tra esperantujo” de s-ro Deguchi Kyotaro. Kiam mi estis lernantino de altlernejo, mi lernis kanton de Noo, utajo dum tri jaroj de noo- prezentisto en Kamakura.

Lastatempe mi eklernis utajon denove de virina noo-prezentisto. En februaro 2023, mi ĉeestis la renkontiĝon en Umewaka noo-teatro. Mi ankaŭ komencis partopreni novan ŝatokupon, fari miajn proprajn noo-maskojn.

Jen la noo-masko, kiun mi nun faras. (foto ⑤-1)

Ĝi fariĝos la noo-masko de knabino, nomata *Koomote*. Noo-maskoj estas ĉizitaj el cipresa ligno. Noo-maskoj reprezentas ne nur homojn, sed ankaŭ demonojn, fantomojn, kaj aliajn karakterulojn. Jen la masko de maljunulo. (foto ⑤-2)

Estas la masko de knabino, ĉi tie.

Kiam mi montras ĝian vizaĝon supren, ĝi aspektas feliĉa. Kiam mi montras la vizaĝon suben, ĝi aspektas malĝoja.

En majo 2023, renkontiĝo estis okazigita por prezenti noon al 30 alilandaj studentoj de universitato. Mi estis tie kiel helpanto de instruisto, kaj enkondukis noo-maskojn en la angla lingvo.

Mi ĝojas ke mi povas prezenti en Esperanto nun.

Fine mi prezentas sekcion de la kanto de noo en japana lingvo kaj Esperanto. Jen la komenco de la kanto nomata *shojo* (猩々) :

“Ĉi tio estas la piedo de la montoj de Ĉinio.
Mi estas vilaĝano nomata Kofu(高風) .”



sezonvorto novembra

Festo de 3-5-7-jara aĝo

Okita Kazumi

Ĝi estas tradicia evento en Japanio por esperi al 3-5-7 jaruloj sanan kreskon.

De malnova tempo oni kredis ke tiuj aĝoj (3 kaj 7-jaraj por virinoj, 3 kaj 5-jaraj por viroj) estas jaroj kiuj venigas malfeliĉon al ili. Tial oni kutimas viziti templojn por eviti malfeliĉon de tiuj infanoj en la 15-a de novembro.



EL NIA MUZEO

Por katalogado

En la Esperanto-Muzeo Jokohama, en oktobro 2023, pli ol 20 mil libroj kaj aliaj esperantaĵoj estas jam katalogitaj. Sed kiamaniere?

En la venonta paĝo, ni montras la klasifikan sistemon uzatan en nia muzeo. La sistemo estas nia propra, por bone sidi al niaj kolektaĵoj.

Libroj el 1930-aj jaroj

Estis antaŭmilita esperantisto, s-ro Kanzya Kaname (1910-1939), bonzo en Kioto. Lia parenco en la lasta julio donacis al la Muzeo 80 librojn kaj 25 aliajn dokumentojn. Multaj estas el la 1930-aj jaroj, inkluzive de libroj el Nederlando, akiritaj de lia tiea korespondanto.

【 Klasifiko de biblioteko 】

- 0.0 Ĝeneralaj**
 - 0.1 Enciklopedio de Esperanto, Esperantaj katalogoj, Interlingvistiko, Ĝeneralajo pri Esperanto, Legado/Trakto pri legado
 - 0.2 Pri Esperanto-movado, Historio de Esperanto
 - 0.3 Organizo/Historio de Esperanto-movado internacia aŭ loka
 - 0.4 Speciala organizo Esperanta
 - 0.5 Libroj koncernaj al Zamenhof
- 1.0 Vortaroj**
 - 1.1 Esperanto-Esperanta vortaro
 - 1.2 Diverslingvaj vortaroj
 - 1.3 Esperanto-japana vortaro/Japana-Esperanta vortaro,
 - 1.4 Esperanto-nacilingva vortaro/Nacilingva-Esperanta vortaro
 - 1.5 Diversaj vortaroj
 - 1.6 Bazaj vortaroj, Vortaro laŭ limigitaj vortoj
 - 1.9 Diversspecaj vortaroj
- 2.0 Lingvistiko, gramatiko, lernolibroj Esperantaj**
 - 2.1 Didaktiko
 - 2.2 Gramatiko, Prononco
 - 2.3 Sintakso, Stilistiko, Frazfarado/Tradukado, Korespondado, Taglibro, Konversacio
 - 2.4 Lernolibroj en Esperanto
 - 2.5 Lernolibroj en nacilingvo krom la

- japana
- 2.6 Lernolibroj en la japana
- 2.7 Legolibroj, Komentario, Libro kun tekstoj Esperanta kaj la japana
- 2.9 Koncernaj al diverslingva studo
- 3.0** Sonmaterialoj, bildoj, bildlibroj, komiksoj, fotoj
 - 3.1 Vidbendoj, Kompaktaj diskoj, DVD, Kasedoj
 - 3.2 Bildlibroj, Bildrankoj, Komiksoj
 - 3.3 Fotolibroj, Bildaro
 - 3.4 Kantaroj
 - 3.5 Ludo,
 - 3.9 Koncernaj al aŭdividaj libroj
- 4.0** Priesperanta literaturo, Originalaj literaturoj en Esperanto
 - 4.1 Priesperanta literaturo, Studo pri literaturo
 - 4.2 Originalaj literaturoj laŭ pluraj esperantistoj
 - 4.9 Originalaj literaturoj en Esperanto laŭ alfabeto ordo de familia nomo
- 5.0** Literaturoj tradukitaj el nacia lingvo
 - 5.1 Stilistiko pri tradukaĵo
 - 5.2 Literaturo el naciaj lingvoj laŭ alfabeto ordo de nomoj de nacilingvoj
- 6.0** Laŭtemaj libroj
 - 6.1 Filozofio
 - 6.2 Historio, Geografio
 - 6.3 Sociologio
 - 6.4 Naturscienco
 - 6.5 Teknologio

- 6.6 Industrio
- 6.7 Arto
- 6.8 Lingvistiko ĝenerale krom Esperanto
- 6.9 Literaturo ĝenerale krom Esperanto
- 7.0** Libroj laŭ Esperantisto laŭ alfabeto ordo de individua persona nomo
 - 7.1 Libroj koncernaj al individuaj esperantistoj krom japanaj
 - 7.2 Libroj koncernaj al pluraj esperantistoj krom japanaj
 - 7.3 Libroj koncernaj al individuaj japanaj esperantistoj
 - 7.4 Libroj koncernaj al pluraj japanaj esperantistoj
 - 7.5 Literaturoj en kiuj aperas "Esperanto" aŭ esperantisto
 - 7.9 Diversaj
- 8.0** Periodaĵoj
 - 8.1 Internacia ĝenerala periodaĵo
 - 8.2 Nacia ĝenerala periodaĵo, laŭ alfabeto ordo de la nacio
 - 8.3 Faka periodaĵo
 - 8.4 Periodaĵo por junuloj
 - 8.5 Periodaĵo por komencanto
 - 8.6 Lokaj organoj en Japanio
 - 8.9 Diversaj periodaĵoj
- 9.0** Diversaj
 - 9.1 Panelo
 - 9.2 Esperantaĵo
 - 9.8 Libroj skribitaj en lingvoj krom Esperanto aŭ nerilataj al Esperanto
 - 9.9 Libroj tute ne rilataj al Esperanto

la klasifiko uzata en nia muzeo

Facile kompreneblaj esprimoj

AKIYA Hideo

Per la reta aplikaĵo Duolingo mi lernadas kelkajn lingvojn preskaŭ ĉiutage. Esperanto, kompreneble, estas unu el tiuj lingvoj, sed tre bedaŭrinde ties kurso nun estas ofertata ne en la japana versio, sed nur en la angla versio por anglalingvaj parolantoj. Mi, nespertulo en la angla, stumblas de tempo al tempo pro malsufiĉa kompreno al la angla, ne al Esperanto.

Tio vere ĝenas min. Ekzemple, en la frazoj de demando fojfoje aperas la angla esprimo “church mouse” (preĝeja muso). Kion ĝi signifas? Iuj vortaroj montras frazekzemplon “poor as a church mouse” (malriĉa kiel preĝeja muso). Do, tio implicas malriĉecon. De kie venas tio?

Mi ne certas, sed iu artikolo en la reto* klarigas, ke en la sakramento de eŭkaristio de katolika kaj ortodoksa eklezioj la pastroj estas zorgemaj por ne faligi panerojn sur la plankon de la preĝejo. Pro tio al la muso mankas sufiĉa manĝaĵo. Do, la preĝeja muso estas malriĉa.

Ho, strange! Kial la muso loĝas en tiom senmanĝaĵa loko? Ĉu ĝi ne foriĝas el la preĝejo por translokiĝi al pli manĝaĵ-plena domo? Eble la implicita signifo havas etimologian historion pli ĝustan, sed tio estas nekonata al iu, kiu ne kutimas iri al katolika aŭ ortodoksa preĝejo.

En lingvo-lernado, esprimoj kun implicita signifo, kiu estas laŭvorte ne klara, ĉiam malhelpas la komprenon de lernantoj. Eble ĉiu lingvo havas strangajn esprimojn kaj nedenskaj parolantoj de la lingvo sentas malfacilecon por akiri ties sencojn.

En la japana, mia patrino lingvo, troviĝas stranga esprimo “la kolo ne turniĝas.” En la okazo se al iu mankas la mono por redoni lian prunton, oni diras, “Lia kolo ne povas turniĝi pro tro da monprunto.” Kia ŝerco! Ĉu estas ia ajn rilato inter la turno de la kolo kaj la kapablo por redoni la prunton? Propre, la homa kolo ne povas turniĝi plene eĉ kiam li ne havas finacan problemon! Mi ne scias, kial tiu esprimo naskiĝis kaj kiel ĝi disvastiĝis en publiko.

Por priskribi avarecon, oni diras “bruligi ungon.” Antaŭe kandelo kaj lampoleo estis multekostaj, do

anstataŭ aĉeti ilin avarulo bruligas sian ungon por ŝpari monon. Sed, verŝajne ne eblas bruligi la ungon, ĉar tio certe vundos al li la fingron mem. Tial mi interpretas la ungon kiel fortonditajn ungo-pecojn. Tiukaze, li povas akiri lumon senvunde, kaj eĉ se li tondas sian ungon, poste ĝi nature kreskos denove senpage!

La kanto “Lumo de lampiroj”** estas fama en Japanio kiel la kanto por adiaŭo ĉefe en la kursofina ceremonio de lernejo. La kanto mem estas bone konata, tamen, ĉu ĉiu scias la signifon de “lumo de lampiroj” kaj “neĝo ĉe fenestro” en la kantoteksto?

Tio originas el malnova ĉina proverbo pri du studentoj. Ili studadis fervore ĝis nokto, sed iliaj familioj estis malriĉaj kaj ne povis aĉeti lampoleon. Tial, somere unu studadis sub la lumo de kolektitaj lampiroj, kaj vintre la alia utiligis la lunlumon reflektatan de neĝo ĉe fenestro. Poste el tio rezultis, ke ambaŭ altiĝis al altrangaj postenoj de tiama dinastio. Ĉi tiu kanto laŭdas diligentecon en studado, kaj oni kantas ĝin aparte en la lernejoj ceremonioj.

En la japana ankaŭ troviĝas esprimoj iom pli facile kompreneblaj eĉ al fremduloj, mi pensas. Ekzemple, “frunto de kato” estas uzata por diri pri malamplakso de spaco. La esprimo “larmo de pasero” temas pri kvanto tre malmulta. Bedaŭrinde mi ne scias kiomaj mililitroj da gutoj pasero verŝas, ĉar mi neniam vidis paseron larmi. Kaj pri mallaŭta, malforta voĉo oni diras, ke iu parolas kvazaŭ “moskito zumas.”

Ĉi tiuj tri esprimoj estas facile imageblaj laŭvorte, ĉar la malgrandaj vivaĵoj nature supozigas, ke temas pri malgrandaj aferoj. Estas preferinde, ke oni pene uzu koncizajn frazojn kun pli facile kompreneblaj esprimoj.

* https://en.wiktionary.org/wiki/poor_as_a_church_mouse

** Origina melodio estas de la fama skota popolkanto “Auld Lang Syne”, en kiu malnovaj amikoj revidas kaj drinkas kun nostalgio al pasintaj jaroj.